

BONA ESPERO

REVUO DE
SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

VOLUMO: 1984/21
NUMERO: 4

ISSN 0006-7024



BONA ESPERO

Revuo de la Sudafrika Esperanto-Asocio [SEA]
ISSN 0006-7024

Redaktoro: Cobus Zeelie
Sub-Redaktorino: Adèle Fouché

Ĉi tiu revuo trimonata aperas en marto, junio, septembro kaj decembro ĉiujare.

La redakcio preferas maŝinskribitajn kontribuojn. Manuskriptoj nepublikigitaj ne resendigos. Nek la redakcio, nek SEA respondecas pri la enhavo de anoncoj aŭ promesoj faritaj en ili.

Redakcia adreso: P O Box 12271
Centrahil
Port Elizabeth 6006
South Africa

Prezo: Membroj de SEA - senpage
Nemembroj - abonu pere de la SEA kasisto ĉe
P O Box 1227
Cape Town 8000
South Africa

Estraro de SEA: Prezidanto - E de Kock
Vic-Prezidanto - A von Blottnitz
Sekretario - O Sher

Kasisto - C Beckford
Komitatanoj - A Appel
A Fouché
J Hammes
F Woolf

Ĉiuj asocioj, societoj, kluboj kaj aliaj, kiuj regule alsendas gazetojn, novaĵajn leterojn kaj tiel plu, bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu revuo. Vidu la redakcian adreson ĉi-supre.

LA REDAKCIO DEZIRAS
AL ĈIUJ SIAJ LEGANTOJ

Feliĉan Kristnaskon
kaj
Prosperan Novjaron



Geseënde Kersfees en Voorspoedige Nuwejaar.....Prettige Kerstdagen en Gelukkig Nieuwjaar.....Frohe Wiehnachten und Gutes Neues Jahr.....Ikrismes Emnandi kunye Nenyibidyala.....Merry Christmas and Happy New Year.....Feliz Navidad y Próspero Año Nuevo.....Joyeux Noël et Bonne Année.....Geseënde Kersfees en Voorspoedige Nuwejaar.. Prettige Kerstdagen en Gelukkig Nieuwjaar.....Frohe Wienachten und Gutes Neues Jahr.....Ikrismes Emnandi kunye Nenyibidyala.....Merry Christmas and Happy New Year.....

ĈEFARTIKOLO

<i>Lasu la ĉapeletojn sur niaj literoj! Parto II</i> <i>[E de Kock]</i>	1
--	---

ARTIKOLOJ/RAKONTOJ

<i>Diversaj pacoj</i>	3
<i>Studentaj fiaskoj [C Zeelie]</i>	3
<i>La banujo [J Valano]</i>	4
<i>Kial Esperanto ne furoras en Sudafriko? [A Fouché]</i>	6
<i>Esperanto-movado en Zairio</i>	6
<i>Iri aŭ ne iri - tio ne estas la demando</i>	8
<i>Tutnova instrumaniero en Hungario</i>	9
<i>Manĝi rekorde</i>	12
<i>Jen persona invito al vi</i>	14
<i>Augsburg - 70-a UK 1985</i>	14
<i>Tagordo - jarkunveno de SEA 1985</i>	21
<i>Afrikaj Esperantistoj deziras korespondi [H Bakker]</i>	25

RUBRIKOJ

<i>Libroj</i>	11
<i>Recenzo</i>	12
<i>La mondo</i>	13
<i>Trilingva artikolo/El nia scienco</i>	16
<i>Ridetu</i>	19
<i>Leteroj</i>	20
<i>Venteraĵoj</i>	22
<i>L'inkpoto</i>	22

<i>ANONCOJ</i>	23
----------------	----

LASU LA ĈAPELETOJN SUR NIAJ LITEROJ! (Parto II)

Daŭrigata el la antaŭa numero

Kvine, nia ortografio estas tutaĵo. Modifi unu ĝian parton alportas la neceson aliigi la ceteraĵojn. Jam bone konata estas la ekzemplo de vorto kiel ĉashundo. Ni ĉiuj scias, ke tiu interna literduo sh reprezentas disajn sonojn, nekonzufzeblajn kun ŝ - laŭ la nuna ortografio. Sed se ĉi lasta mem estus skribata kiel sh, enŝteliĝus tuja konfuzeblo. Ĝenerale la proponantoj modifi nian skribsistemon ne haltas ĉe la forigo de la ĉapeletoj. Samtempe ili malamas ankaŭ precipe la u kaj diftongigan j. Temas pri lezo de regulo, ke oni ĉiam akcentas la antaŭlastan silabon, kio tiel mirinde plifaciligas la taskon lerni Esperanton kompare al aliaj lingvoj. Nia nuna skribsistemo bonege kaj senescepte reliefigas tiun faktoron. Sed ĉe proponitaj alternativoj la leganto jam ne scios plencerte kiel prononci vortojn kiel balau, bonai, homoi ktp (ĉar ne plu ekzistos diferenco inter u kaj ŭ, ai kaj aj, aŭ oi kaj oj). Tiaĵoj konsistigas malprogreson kontraŭ la vera progresema de la ortografio Zamenhofs.

Sese, ortografiaj ŝanĝoj kuraĝigus inter ni ankaŭ sur aliaj kampoj, tiun reformemon kiu ĉiam minacadas la ideon de unueca lingvo internacia. Elektinte sian filozofion pri ĉi tio, Esperanto devas strikte konservi sian stabilecon pene akiritan kaj ankoraŭ tro labilan. Ni lasu la sinmortigajn ŝanĝigemon kaj eksperimentojn senfinajn al la enterigejo kiu jam entenas Idion Neutral, Idon, Occidental, Novial kaj Interlingua ne mem aliĝu tiun pereintan kaj pereontan bandon. La supozo, ke la disvastiĝon de Esperanto malhelpas niaj ĉapeletoj, tio estis iam interesa, sed ĝin jam kontraŭdiras ilia sorto. Kiel atentigas H Jakob en sia libro 'A Planned Auxiliary Language' p. 114: "Esperanto estas la sola planlingvo kiu uzas novajn supersignojn por ŝanĝi la valoron de la konsonanto". Jes ja...kaj la sola kiu supervivis. Ĉu malgraŭ aŭ eble ĝuste pro tiu elpaŝo progresema, inter aliaĵoj?

Sepe, ne eblus ŝanĝi nian skribsistemon laŭ maniero pri kiu povus konsenti ĉiuj. Eĉ unu paŝo sur tiu vojo necesigos pliajn adaptojn, endanĝerigante nian aferon, ĉar tio forpelus la ordinarulojn, kiuj reprezentas la plejmulton. Kiu povus decidiĝi, sen arbitro, inter la meritoj difinitivaj de la alfabetproponoj kiujn elpensis Setäla, De Hoog, Lienhardt aŭ aliaj? Akcepti unu projekton malfermus la pordon ankaŭ al la neceso konsideri ideojn eble eĉ pli bonajn. Efektive multaj proponoj, kiel ajn belaj laŭ la elpensintoj aŭ ties amikoj, konsistigas fuŝojn. Frapanta ekzemplaro troviĝas en la t.n. 'Optimala Ortografio' de Albert Lienhardt. Laŭ sia emo Naturalisma li klopodas similigi Esperanton al la etimologiaj bizaraĵoj karakterizaj de la Franca, la Angla ktp, kun suverena senkonsideremo por homoj ekster Europo, kiujn ĉagrenas sed jam ankaŭ tedas la kulturimperialismo tiukontinenta. Kion alportas tiu sinjoro? Interalie, li deziras enkonduki diversajn literojn por la samaj sonoj, ekzemple la tri variantoj gj, dj kaj jh anstataŭ nia nuna ĝ, kaj q apud k, kiel en quankam! Li eĉ ne hezitas ŝanĝi la sonkonsiston de multaj vortoj, ekzemple anĝelo al ange-lo, kaj substitui ilin per tute aliaj, kiel svimi por naĝi. Temas, efektive, pri tuta reformprojekto. Cetere li ne scias respondi la gravan kritikon de unu klarvidulo, kiu asertis, ke tiel "la tuta ĝisnuna Esperanto-literaturo iĝus arkaika"..Ŝajne Lienhardt ne komprenas aŭ la poeziaĵojn aŭ la bonan prozon, ĉar li naive supozas, ke oni simple povus anstataŭigi la vortojn ekzistantajn per la novaj kaj represi la librojn. Sed tiametode ŝanĝi la sonstrukturon de teksto konsistigus, ofte, detruigi ĝian valoron artisman. Ne, ni devas rifuzi kiel la projekton de Lienhardt, tiel ankaŭ ĉiujn tiaĵojn. Ĝenerale ili alportus difektojn pli seriozajn ol la supozitajn en la nuna ortografio. Kaj pri la relativaj meritoj de unu reformosistemo super la aliaj oni ne konsentos. Sed ni jam havas bonan alfabeton. Kial do ni ne povas konsenti sur ĉi tiu bazo, konservante la jam atingitan unuecon?

Edwin de Kock, Akademiano (Sudafriko)

Daŭrigota,
Parto III en
Numero 1985/22/1

LA BANUJO

– Vi estas la nokta akceptisto, ĉu ne? Rakontu al mi, kio okazis.

– Nu, sinjoro policano, en ĉi tiu hotelo... ĉio okazis... kiel komenci?... pro la banujo.

– La banujo, ĉu? Kiun rilaton povas havi banujo kun la ŝtelo, pri kiu mi esploras? Ĉu vi mokas min?

– Ne, ne, sinjoro policano, kiel mi povus? Mi estas plej serioza. Nur tio okazis, ke akvo fluis en la banujon, kaj mi timis...

– En kiun banujon? Iom da klareco, mi petas, homo, iom da klareco.

– En la banujo de ĉambro n-ro 104.

– Kie estas ĉambro 104?

– Oni vidas ĝlan pardonon de ĉi tie. Estas la unua tie supre, ĉu vi vidas? Tuj apud la ŝtuparo. Nu, la banujo...

– Ĉu iu okupas tiun ĉambron?

– Okupis, jes. Okupas, ne. Ŝi malaperis.

– Kiu ŝi estis?

– Frenezulino. Tial mi timis, kiam mi konstatis, ke la banujo...

– Frenezulino, ĉu?

– Nu, ŝi agis freneze. Mi estis ĉi tie, je mia loko, ĉe la akcepto-tablo. Estis proksimume la tria nokte. Mi turnis min por preni gazeton de sur la tableto, malantaŭ mi, kaj kiam mi returnis min, jen ŝi estis...

– Nu, rakontu plu. Kial vi subite haltas?

– Ho, sinjoro... La simpla fakto rememori rapidigas mian koron. Jen sur la akcepto-tablo ŝi sidis, nuda, kun longa cigaredo en sia kisinda buŝo, kaj...

– Tute nuda, ĉu vere?

– Nuda, tre nuda, jes, sed ne tute. Ŝi surhavis kol-tukon, belan, multekostan sed... nu, vi scias, kiaj estas koltukoj... ne tre grandan. Ĝi kaŝis nenion.

– Kion ŝi faris?

– Nenion. Ŝi nur sidis, sendis al mi la fumon de sia cigaredo, ridetante.

– Kaj kion faris vi?

– Mi ne sciis, kion fari. Mi estas akceptisto en hoteloj de dudek jaroj, sed neniam mi travivis ion similan. Unua-foje en mia vivo nuda knabino troviĝas antaŭ mi ĉe hotela akceptejo. Mia koro bategis. Mi provis diri ion al ŝi, sed la vortoj ne venis. Mi nur pensis: "Se la mastro alvenus nun!" Finfine mi komencis diri: "Sinjorino, en ĉi tiu hotelo..." Sed ŝi min interrompis. Ŝi rigardis min rekte en la okulojn — mia koro mia kompatinda koro salt-kuris ne-rege-



ble! — kaj ŝi diris, per tre profunda voĉo: "Mi amas vin".

– "Mi amas vin", ĉu? Tiel!

– Jes, tiel: "Mi amas vin". Tiam ŝi ekridis treege forte, dum longega minuto. Kaj subite, ŝia esprimo tute ŝanĝiĝis. Ŝi rigardis min plej serioze kaj diris: "Mi amas vin

tiom, ke mi igos vin riĉa. Nur atendu." Ŝi eksaltis de sur la tablo kaj supren-iris la ŝtuparon. Tiam mi vidis, ke ŝi eniras en ĉambron 104. Ŝi estis tre bela, ankaŭ dorse.

– Ŝian belecon ni lasu flanke. Kio interesas min, tio estas faktoj.

– Nu, ŝia beleco estas fakto.

– Kio okazis poste?

– Post ne-longe ŝi revenis saltante kiel infano de ŝtupo al ŝtupo, kaj danca-paŝe ŝi reproximiĝis al mi. Mia koro...

– Lasu vian koron trankvila, kie ĝi estas. Mi bezonas *faktojn*, mi diris.

– Kiel mi povas scii, kio estas fakto por vi? Mia kompatinda koro plej zorgige rapid-dancis. Tio estas fakto. Same kiel estas fakto, ke mi ne plu estas juna, kaj ke mia koro...

– Sufiĉe pri via koro! Kion ŝi faris?

– Ŝi tenis manon en la mano, ne, mi volas diri: monon en la mano. Ŝi residiĝis sur la akcepto-tablon, prenis krajonon, kaj komencis skribi sur ĉiu monbileto. Ĉiufoje, post kiam ŝi skribis kelkajn vortojn, ŝi kisis la bileton kaj ĵetis ĝin en la aeron, laŭ plej diversaj direktoj. Unu falis sur min. Sur ĝi estis skribite: "Mi amas vin". Nekredeble, ĉu? Kaj jen, kiam mi ekstaris sur seĝon por kapti bileton, kiu ĵus flugis sur la plej altan folion de tiu granda planto, tie, mi ekaŭdis la bruon...

– Kiun bruon?

– Akvo fluis en la banujon. Tute certe, ŝi antaŭe senvestiĝis por sin bani, komencis plenigi la banujon, kaj poste forgesis pri ĝi. Laŭ la bruo, kaj ankaŭ laŭ la tempo, kiu pasis ekde ŝia alveno malsupren, la banujo certe jam estis plenplena. Mi kriis:

"La banujol" kaj vells suprenkuri. Sed ŝi ekkaptis min kaj premis min al sia nuda korpo. Kiel vi vidas, mi estas neĵuna kaj malforta, kaj... kaj... kaj...

– Kaj ŝia faro ne malplaĉis al vi, ĉu? Diru la veron homo!

– Vi malpravas, sinjoro, tiu situacio estis por mi terura. Mi pensis pri la banujo, mi pensis, ke se la mastro alvenus... Nu, mi sukcesis liberigi min kaj kuris al la ŝtuparo kaj la ĉambro 104, kies pordo estis neŝlosita, kaj nefermita, cetero. Mi rapidis al la banujo, haltigis la fluon kaj eligis profundan elspiron de senpeziĝo. Mi estis alveninta ĝusta-tempe.

– Kaj kion faris dume via frenezulino?

– Ŝi de ekstere ŝlosis la pordon, ekridegis, kaj malaperis. Mi estis enŝlosita! Mi provis telefoni, sed la dratoj estis tranĉitaj: la telefono ne funkciis. Mi frapis la murojn, sed neniu respondis. Ĉambro 103 ne estis okupita, kaj el ĉambro 105 venis neniu helpo; tiun, ŝajnas, la kun-planulo havis. Mi kriis, sed neniu aŭdis min. Mia voĉo ne estas forta, kaj nia hotelo reklamas ĝuste pri tio, ke la sonoj tute ne transpasas de unu ĉambro al alia. La mastro elspezis riĉegon por tion aranĝi. La banujon mi antaŭe aŭdis nur, ĉar la ĉambropordo estis nefermita. Pasis almenaŭ unu horo, antaŭ ol iu aŭdis min. Kaj tiam, necesis, ke mi klarigu, ke mi estas enŝlosita kaj ke oni iru veki la mastron. Ni perdis multe da tempo.

– Ili ne bezonis tiom da tempo por perforti la valorajan ŝranketon kaj forŝteli ĉion, kion ĝi enhavis. Ili scias, ke ĝuste hodiaŭ s-ino De Kastelforta tranoktas ĉe vi kaj lasis ĉe la akceptejo sian tutan oron kaj la

tutan kolekton de siaj altvaloraj plibeligiloj.
Nu, nu, homo, mi ne ŝatus stari je via loko.
Via mastro certe ne gratulos vin.

– Sed kion mi povis fari? Mi ĉiam diras, ke ni bezonas pardiston, eĉ se la hotelo estas malgranda.

– Tio estas via problemo, ne mia. Nu, dankon. Vi povas foriri nun. Sed mi havas konsilon por vi.

– Konsilon, ĉu?

– Jes. Tiuj okazaĵoj estis premaj, maltrankviligaj, vi bezonas malstreĉon. Nu, kio pli malstreĉas ol longe kuŝi, ĝue, — ĉe plej malforta lumeto — en la plaĉa varma akvo de sia banujo? Banu vin, homo. Sed ne endormiĝu. Al via malforta koro ne taŭgas nudulinoj. Eĉ sonĝaj. ■

Johan Valano, Svislando

so (14 lernantoj), Lukala (11 lernantoj), Kimpese (11 lernantoj), Kuilu-Ngongo (10 lernantoj) kaj Luozi (?). Krom la kursoj en tiuj kluboj, estas multaj interesitoj kiuj lernas per korespondkurso.



KIAL ESPERANTO NE FURORAS EN SUDAFRIKO?

Antaŭ nelonge oni publikigis en ESPERANTO intervjuon kiun kondukis d-ro Sadler kun d-ro Saheb-Zamani de la Teheran Universitato. Al la demando 'Kial Esperanto furoras en Irano?' d-ro Saheb-Zamani mallonge respondis jene:

Antaŭ 30 jaroj - kiam 16-jaraĝa - li trovis libron pri Esperanto. Li kaj kelkaj amikoj studlegis ĝin. Tiutempe neniu en Teheran sciis multon pri la lingvo. Poste kiam en Eŭropo pro studado, li tro okupiĝis por pensi pri la internacian lingvon

ESPERANTO-MOVADO EN ZAIRIO

ESPERANTO (Oktobro 1983 p. 165 priskribas la movadon en Zairio kiel 'la plej forta landa Esperanto-movado en Afriko'. Ĝi estas unu el la du aliĝintaj landaj asocioj de UEA en la vasta kontinento (la dua estas SEA).

En 1981 la agado stagnis. Hodiaŭ ekzistas tre aktiva Esperanto-Instituto de Zairio (EIZ). De nenio pli ol plurlokaj izolitaj Esperantistoj en la lando ĝis multaj aktivuloj en la nuna jaro EIZ montris, ke preskau senhelpe ili forte sukcesis. Estas jam kvar delegitoj de UEA en Zairio. Ekzistas kluboj en Kinŝa-

kaj ankoraŭ 2½ jaroj preterpasis antaŭ ol li ree elprenis siajn notojn pri Esperanto. Por demandi kiel statas la afero de la lingvo en la mondo, li perletere kontaktis Brition, Francion kaj Nederlandon, kiuj konvinkis lin, ke ĝi vere kaj aktive vivas. Li tiam instruis siajn gepatrojn kaj kelkajn infanojn (unu nur 9-jara) kaj poste anoncis al siaj universitataj studentoj, ke la venontan semajnon li rakontos al ili 'pri io tre nova kaj interesa, kaj pri kio ili certe neniam antaŭe aŭdis'. La studentoj fariĝis tre scivolemaj kaj amase venis al la lekcio.

Unue li prelegis pri la lingvoproblemo sed menciis nenion pri Esperanto. Nur post unu horo li klarigis, ke sia opinio solvo ja ekzistas en la formo de internacia lingvo nomita Esperanto. Tiam sekvis enkonduka lekcio pri la lingvo. La studentoj sufiĉe entuziasmiĝis por peti lin instrui al ili la lingvon!

Komence li instruis nur 15 personojn. Intertempe li ĉerpis kaj kompilis mallongajn novaĵojn koncerne aferojn pri kiuj li legis en gazetoj. Do, post nelonge multaj artikoloj el la diversaj ĵurnalaj mondnovaĵoj ekaperis por informi pri Esperanto. Rezulte de artikolo kiun li aperigis en universitata revuo, kelkaj ĉefoj de la universitato petis, ke li prelegu pri la lingva revolucio. La rezulto estis refoje la sama: multaj aŭskultantoj scivoleme demandis pri kiel lerni la lingvon!

Post ne longe ne malpli ol 2 500 studentoj estis lernantaj Esperanton ĉe la universitato, kaj pluaj 4 500 personoj meminstruis sin private. Aldone 50 000 iranaj studentoj tiutempe studadis en Usono kaj ties gepatroj en Irano skribis al ili pri la lingvo: "Ĉi tie ĉiu parolas pri ĝi - eble vi devus lerni ĝin?"

Ĉu ne vivanta kaj reala pruvo, ke unu homo povas krei amas-movadon pri Esperanto? Antaŭ preskaŭ 100 jaroj ĝuste tion faris ankaŭ Zamenhof. Kiu(j) pretas fari la samon en Sudafriko?

A. Fouché, Sudafriko

IRI AŬ NE IRI - TIO NE ESTAS LA DEMANDO

Ke ni ĉiuj iutempe devas morti estas certe, sed kelkaj homoj iras al siaj tomboj en maniero kiu igas nin rideti, kelkfoje ankaŭ kun larmo en la okulo. Britaj aŭtoroj Peter Bowler kaj Jonathan Green kolektis pli ol 600 el la plej amuzaj kaj strangaj okazoj de mortiĝo en sia libro "WHAT A WAY TO GO", post nelonge eldonota en Sudafriko.

:Woodrow Creekmore veturis apud sia hejmurbo Chickasha en Oklahomo kiam lia aŭto frapis lumstangon. Ŝokite kaj konfuzite li eliĝis el sia rompita aŭto kaj ekklarigis al policano kio okazis kaj kiel bonŝanca li estas, ke li supervivis. Tiumomente la stango falis sur lian kapon, tuj mortigante lin.

:Edward Danvers kolapsis en kafejo ofte vizitata de vetludantoj. Tiuj ĉi ĉirkaŭstaris lin kaj senhonte vetis ĉu li vivos aŭ ne. Kiam kelkaj apudstarantoj penis helpi lin, tiuj estis forte detenataj ĉar tio 'tuŝus la rezulton de la vetado'. Edward mortis.

:Greka aŭtoro mortis kiam aglo lasis fali sur lian senharan kapon testudon. La birdo erare vidis la brilan kupolon kiel rokon sur kiu ĝi povus rompi la ŝelon de la testudo.

:Usonajn vagabondojn Pat Burke kaj Billy O'Rourke oni portis al hospitalo kie ili ricevis sian unuan baniĝon en 20 jaroj. Kuracistoj ne estis certaj ĉu ili mortis pro ŝoko aŭ pro la forta frotbrosado.

:Germana ĉarpentisto laboris sur tegmento kiam mortfrapis lin 1,8 metrojn longa glaciaĵo de el la ĉielo - la glaciiginta forĵetaĵo de aeroplana tualetto!

:Kanada soldato Majoro Summerford estis viktimo de fulmofrapoj dum sia tuta vivo. En 1918 fulmo frapis lian ĉevalon kaj li rezulte de tio tiel vundiĝis, ke oni eksigis lin el la armeo. Ses jarojn poste li parte paraliziĝis, kiam fulmo frapis lin fiŝkaptantan apud lia Vankuvera hejmo. Li tute

paraliziĝis post pluaj ses jaroj, kiam fulmo refoje frapis lin. Post nelonge li mortis pro la amasiĝintaj vundoj. Fine du jarojn poste, fulmo frakasis lian tomboŝtonon.

TUTNOVA INSTRUMANIERO EN HUNGARIO


En antaŭnelonga kurso la partoprenantoj ne rajtis uzi kaj malkovri siajn verajn nomojn kaj profesiojn. La celo de la metodo estas liberigi la lernanton de la ŝarĝo de socia prestiĝo. Plue, la deziro estas iumaniere enŝteli la gramatikon en la kapojn per cerbotrafa metodo. Kiel fari tion? La tradicia nigra tabulo ne estis uzata. La lernantojn ĉirkaŭis barilo el afiŝoj kiuj pendis dum la tuta kurso en la prelegejo. Por interesigi la lernantojn, oni koncentriĝis nur pri modernaj ĉiutagaj aferoj. La participoj, kiuj cerbumigas plej multajn lernantojn, oni ekzemple pritraktis jene:



1 KIAM MI ALVENIS
HEJMEN...

JUNULO ESTIS AMONTA MIAN EDZINON
MIA EDZINO ESTIS AMOTA DE JUNULO





JUNULO ESTIS AMANTA MIAN EDZINON
MIA EDZINO ESTIS AMATA DE JUNULO



JUNULO ESTIS AMINTA MIAN EDZINON
MIA EDZINO ESTIS AMITA DE JUNULO

Ŝajne la sukceso estis tre notinda!


EL HUNGARA VIVO

— Mi estis plene trompita de tiu aĉulo! Aŭskultu, Eval! Jam post la inaŭguro, eĉ jam posttagmeze dum la solena malfermo, mi dediĉis al li mian plenan amon, ĉar mi naive kredis liajn amkonfesojn. Kaj jen, li alcelis nur miajn Esperanto-insignojn el Oceanio...



LIBROJ

- :ĈU VI KONAS LA TERON? Endre Dudich. Formato 230x165 mm; 150 paĝoj plus 68 da scienc-teknikaj anoncoj. ISBN 963 571 080 1. Prezo 12 00 gld plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj. Sola distribuanto estas la Libroservo de UEA. .
- :ANTAŬ LA NOVA JARMILO - Ideoj por la vivo el mondo minacata. Eldonata okaze de la Jubilea Jaro 1987, kaj prezentas tutmodan sumon de pensado, sentado, pritaksado kaj programado. Eldonas Esperanto-Centro, Hermann Behrmann, Poŝtfako 1450, D-4790 Paderborn, FR-Germanio.
- :ESPERANTA ANTOLOGIO: POEMOJ 1887-1981. Reviziis kaj renovigis William Auld, kiu redaktis ankaŭ la unuan eldonon. 883 paĝoj; 850 poemoj; 163 poetoj. Jubilea Kolekto "Jarcento de Esperanto" numero 1. Plumbe presita, fortike bindita kun ora surpriso, silka paĝindikilo. Formato 22x16 cm. ISBN 92 9017 030 1. Prezo 60,00 guldenoj plus sendokostoj; rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj. Mendu ĉe Libroservo de UEA.
- :FAKTOJ KAJ FANTAZIOJ. Marjorie Boulton. Longe atendita legolibro. Speciale komisiita de UEA por tiuj, kiuj apartenas al la kategorio 'progresantoj'. La libro ekzercigas pri frazkonstruado kaj pligrandigas la vortostokon de la leganto. 52 ĉapitroj; formato 210 mm (A4) kun 431 paĝoj. Enhavas rakontojn pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo. ISBN 92 9017 028 X. Prezo 36,00 guldenoj plus sendokostoj. Kutima rabato se mendata de la Libroservo de UEA.
- :NORVEGUJO. Senpage haveblas de Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schousv. 18, 0572 Oslo 5 nova broŝuro pri Norvegujo. Ĝi enhavas ok paĝojn da koloraj bildoj kaj dek ses da teksto. Tre bona reklamilo por nia afero! Mendu senprokraste.

RECENZO

Aperis grava scienca verko ĈU VI KONAS LA TERON? ĈAPITROJ EL LA GEOLOGIAJ SCIENCOJ de d-ro Endre Dudich, eldonita de Scienca Eldona Centro de UEA, Budapeŝto.

Ĉi tiu altnivela enkonduko el la geologio estas plej grava kaj plej ampleksa antaŭdenpaŝo sur la kampo de tiu scienco en la Internacia Lingvo. La aŭtoro

traktas en populariga maniero tra 12 ĉapitroj la jenajn subbranĉojn de la geologio: geonomion, geokemion, mineralogion, dinamikan geologion, petrologion kaj sedimentologion, paleontologion, tektonikon, terinternon, terhistorion kaj stratigrafion, aplikajn geofizikon kaj geologion, kosmogeologion kaj planedologion.

Ĉiun ĉapitron akompanas abundaj figuroj kaj tabeloj, kiuj vivigas kaj klarigas la tekston. Fine aperas geologia leksikoneto kaj listo derekomendita Esperanta kaj alilingva literaturo.

Vidu la anoncon sub "LIBROJ" p.11)

MANĜI REKORDE

La brito Peter Dowdeswell manĝis en unu minuto kaj dudek du sekundoj 1360 g da terpomoj. La kaliforniano Ronald Alkanavoris dek sep bananojn en 120 sekundoj. Thomas Greene sukcesis formanĝi 250 ostrojn en kvar minutoj; la usonano ankaŭ ensuĉis 91-metrolongan spageton en 27 sekundoj.....

EI KONTAKTO.

... ..



:Britujo - Antaŭ nelonge en la rubriko 'Postmarks, Places, People' (Poŝtmarkoj, Ejoj, Homoj) de THE STAMP MAGAZINE (Aprilo, 1984, p. 64) Ken Forster skribis longan artikolon

kun titolo: 'Esperanto in the mail'. Kun la artikolo aperis represoj de kelkaj Esperanto-poŝtmarkoj, unu el kiuj estas japana kaj kiu portas desegnaĵon de Zamenhof klare japan-aspekta! En la interesa artikolo Ken Forster skribas mult-

ton pri sia amikeco kun Marjorie Boulton, bonkonata verkistino, ekde 1949 kiam ŝi estis juna studentino ĝis la nuna tago. Tempo dum kiu ili forte interŝanĝis poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. Sekvas post tio multa informo pri diversaj Esperanto-poŝtmarkoj



ĝisdate. (Ensendis s-ro Z Stifter, Sudafriko)

:Usono - Aperis en la fama usona universitato Harvard THE HARVARD CRIMSON 300-vorta artikolo pri Esperanto far Roy McCoy.

:Jugoslavio - La loka stacio Radio Split de julio elsendas (al p. 20)

JEN PERSONA INVITO AL VI

Por kunfesti la Centjaran Jubileon de Esperanto kun ĉiuj ne prokrastu la akcepton de ĉi tiu invito, ĉar la jubileaj festoj jam komenciĝis. Akcepti la inviton signifas aliĝi kiel individua membro de UEA. Kiel membro vi regule ricevados la informojn pri la jubileaj laboroj. La sudafrika kotizperanto estas: Colin Beckford, P O Box 1227, CAPE TOWN 8000.

Membrokotizoj.....MJ(-K) = Individua membro kun la Jarlibro kaj ĝis inkl. 25 jaroj, la revuon Kontakto R12
 MA(-K) = Individua membro-abonanto kiel MJ(-K), plus revuo Esperanto R30
 DM = Dumviva membro pagas por la tuta vivo en unu fojo, 25-oblon de la kotizo de MA. Oni ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj dum ankoraŭ malpli ol 26-jara, la revuon Kontakto. Do por la venonta jaro kostas 25 x R30

Aliaj.....SA = Simpla abono al la revuo Esperanto sen membreco en UEA R18
 Kto = Abono al la revuo Kontakto sen membreco en TEJO/UEA R9

AUGSBURG - 70-A UK:3-10 AUGUSTO 1985

Oficiala peranto: Colin Beckford, P O Box 1227, CAPE TOWN 8000.

Grava atentigo rilate ĉambroperadon: La solan rezervigraĵon por ĉambroj havas LKK en kunlaboro kun trafikoficejo Augsburg. Ili peras la ĉambrojn sen iu ajn profito. Ne havas sencon turni sin rekte al iu ajn hotelo. Kiu ne observas tion, riskas esti loĝigita ie ajn en la periferio de la kongresurbo! Post via aliĝo Centra Oficejo de UEA sendos al vi bultenon, ĉambro-

mendilon kaj mendilojn por ekskursoj, antaŭ- kaj post-kongreso. Jen la kategorioj. La ĉambroprezo inkluzivas matenmanĝon kaj servomonon:

A 105-155 GM	unulita ĉambro kun bano/duŝo kaj WC
B 70-95 GM	unulita ĉambro kun bano/duŝo kaj WC
C 45-65 GM	unulita ĉambro kun fluanta akvo
D 30-40 GM	unulita ĉambro kun fluanta akvo

A 170-205 GM	dulita ĉambro kun bano/duŝo kaj WC
B 110-150 GM	dulita ĉambro kun bano/duŝo kaj WC
C 70-100 GM	dulita ĉambro kun fluanta akvo
D 45-65 GM	dulita ĉambro kun fluanta akvo

LKK sukcesis trovi taŭgan ejon por infan-kongreseto en trankvila kvartalo de la kongresurbo

IRU, RIGARDU KAJ ĜUU !!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

(Red. Vidu ankaŭ la anoncojn sur p. 26)

(Studentaj fiaskoj: de p. 3)

medikamentoj por timemuloj havas malhelajn kolorojn kiel bluan, verdan, brunan ktp. Tamen, la decidon pri koloro influas multaj faktoroj. Ekzemple, plenaĝulo kun malvarmumo bezonas stimiladon; aliflanke beboj kun la sama malsano, kaj kiuj ne pensas aŭ agas kiel plenaĝuloj, bezonas trankviligon pro la perturbo rezulte de iliaj alta korpotemperaturo. Plue, oni memoru, ke certaj koloroj harmonias kun certaj gustoj: ruĝa, flava = frukta; verda, blanka = pipramento; verda = pipramenta aŭ limeda ktp.


Unu el miaj studentoj insistis malharmonii siajn kolorojn per malĝustaj gustoj aŭ pro neintereso aŭ pro simpla stulteco. Dum unu jarfina ekzameno pri la kunmetado de medikamentoj, li mirakle sukcesis per verda koloro

(al p. 18)

TRILINGVA ARTIKOLO

Esperanto: Kiel malfacile estas kredi ĉion pri nia mondo se oni alrigardas elspace la tre belan bluan planedon kaj ĝiajn blankajn makulojn ŝajne kirliĝi ĉirkaŭ ĝin. Tamen, en ĉiu minuto naskiĝas 260 homoj kaj mortas 98. Spacveturistoj ĉiuj samopinias, ke ordinara homo ne kapablas kredi, ke 4 000 000 000 homoj loĝas sur Tero! Unu kialo por la senfinaj kaj treege multekostaj spacprojektoj estas la nereĝebla plimultiĝo de la monda loĝantaro - tiuj 260 naskiĝoj kontraŭ nur 98 mortigoj en ĉiu minuto. Oni jam kalkulis, ke sekve de la nuna rapideco de novnaskiĝuloj ĉiutage, al la planedo entute mankos sufiĉa surplaneda spaco kaj manĝaĵo por nutrisiajn homojn. Dank' al la apero de la komputilo kaj lasero la homaro faris fortan kaj rapidan progreson de la unua Sputnik en 1957 ĝis la nuna Kolumbio. La usonanoj jam planas konstrui la unuan enspacan esplorstacion en 1985. La projekto havas pluan celon - usono volas funkciigi antaŭ la jaro 2000 la unuajn ĥemiajn kaj manĝaĵajn fabrikejojn en la spaco. Kaj ne pro memgajno, ĉar la 5 000 000 000 surloĝantoj de Tero estos tre malsataj en la jaro 2000!

Afrikaans: Hoe moeilik om alles omtrent ons wêreld te glo as 'n mens van die ruimte kyk na ons baie mooi blou planeet en sy wit kolle wat skynbaar om hom krul. Nietemin word daar elke minuut 260 mense gebore en sterf 98. Ruimtevaarders stem almal saam dat die gewone mens nie kan glo dat daar 4 000 000 000 mense op Terra bly nie. Een rede vir die eindelose en baie duur ruimte projekte is die onbeheerbare toename in die wêreld populasie - daardie 260 geboortes teenoor slegs 98 sterftes per minuut. Dit is reeds bereken dat, teen die huidige tempo van nuwe geboortes per dag, die planeet 'n algehele tekort aan genoeg plek en voedsel om vir sy mense te sorg, sal hê. Danksy die verskyning van die rekenaar en laser het die mensdom sterk en vinnig gevorder vanaf die eerste Spoetnik in 1957 tot die huidige Columbia. Die Amerikaners beplan reeds om die eerste ruimte navorsingstasie in 1985 te bou. Die projek het 'n verdere doelwit - Amerika wil voor die jaar 2000 die eerste chemiese en voedsel fabriek in die ruimte in werking hê. En nie vir eiegewin nie,




(Studentaj fiaskoj: de p.15)

kaj pipramenta gusto por sia bonaspekta likva preparaĵo. Bedaŭrinde la produktaĵo estis uzota kiel klistero! La preparaĵo estis tute neakceptinda - ankaŭ la studento kiel farmaciisto. Li ripetis tiun studjaron.....

Cobus Zeelie, Sudafriko



RIDETU




Kio estas la diferenco inter moderna kaj malmoderna fraŭlino?

Moderna fraŭlino hontas kiam ŝi ruĝiĝas kaj malmoderna fraŭlino ruĝiĝas kiam ŝi hontas.....

"Kial mi volas rezegni? Mi vidas ŝin kiel 65% da oksigeno, 10% da hidrogeno, 18% da kalio, 3% da nitroĝeno, 1,5% da kalcio, 1% da fosforo....."




"La drogo mem ja estas sen iaj flankaj aŭ malplaĉaj efikoj. Tamen la prezo eble kaŭzos senekvilibrigon kaj svenemon....."

Bona Espero  Poŝtfako 12271 Centrahil 6006

DIRAS NIAJ LEGANTOJ.....

En BE/1984/21/3 sur paĝo 20 aperis novaĵo pri demonstracio en La Hago. "Duona vero povas misinformi pli ol mensogo" skribis leganto pri tiu ero:

Al la Redaktoro, BONA ESPERO, Poŝtfako 12271, Port Elizabeth.
Estimata S-ro Zeelie -



Dum la 550 000 'spertuloj pri Monda Strategio' demonstraciis kontraŭ starigo de nukleaj armiloj (parto de la NATO-defenda sistemo kontraŭ la 223-tri-kapaj rakedoj jam starigitaj far la Kremlin) ankaŭ la OSL (Ligo de Eks-Batalantoj), kies membroj en la jaroj 1940-1945 riskis sian vivojn por la liberigo de la nederlandaj kaj aliaj popoloj, havis en la aero superkape de la demonstraciintoj aeroplane trenatan mesaĝon en gigantaj literoj: PREFERE RAKEDO EN LA GARDENO OL RUSO EN LA KUIREJO. Foton montrante la okazon mi vidis en STAVAST n-ro 11-12/1983, la organo de la OSL ("Oud Strijders Legioen en de stichting voor vrijheid en vijligheid").

Do montriĝis, ke en Nederlando ankaŭ troviĝas homoj kiuj respektas la jam faritan decidon far la demokrate elektita parlamento. Bedaŭrinde la manipulatemaj simpluloj en la popolamaso parotas tion, kion al ili instrukcias pere de publikaj medioj la "vulpo kiu predikas pacon".

H W Appel, Sudafriko

•••••

(La Mondo, de p. 13)

regule ĉiuĵaŭde pri kaj en Esperanto. Redakcia adreso estas:
Radio Split (EE), Mažuranićevo ŝetalište b.b., YU-58000 Split,
Jugoslavio.

TAGORDO: JARKUNVENO DE LA SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO 1985

1. Antaŭa protokolo kaj traktado de aferoj estiĝantaj el ĝi.
2. Raporto de la prezidanto.
3. Raporto de la sekretario kaj pritraktado de korespondanĵoj.
4. Raporto de la kasisto.
5. Elekto de nova estraro.
6. Aliaj aferoj.

Mi petas, ke oni sendu al mi, k.e.p. frue, nomojn de membroj, kiujn oni deziras proponi por elekto al la nova komitato/estraro, kun ties konsento agi se elektitaj. La nunaj komitatanoj estas petataj informi min, ĉu aŭ ne ili konsentas al refoja elekto por plua jaro.

Membroj, kiuj ne povas ĉeesti la kunvenon, estas petataj ensendi siajn komentojn, opiniojn ktp, por ke oni povu pritrakti ilin sub la ĉi-supra ero 3. Mi speciale deziras ricevi raportojn pri Esperanto-agado de la diversaj grupoj tra la lando.

La financa raporto por la jaro 1984 aperas sur aparta folio.


La prezidanto, estraro kaj ĉiuj komitatanoj deziras al niaj membroj, kiel ankaŭ al ĉiuj legantoj de BONA ESPERO feliĉan kaj prosperan novan jaron, en bona sano kaj en paco.

O Sher, Sekretario de SEA

VENTERAĴOJ

Dum la kelkaj jaroj antaŭ 1920 mia patro, forlasinte la angla-lingvajn regionojn de East London kaj King William's Town ktp, troviĝis en la afrikanslingvaj, malvarmaj, montaraj svisujaspektaj regionoj de Motkop kaj Lady Grey. Liaj tieaj "klientoj"

pleje estis farmistoj. Tiame troviĝis iu ĝena bruta malsano kaj farmistoj estis petataj sendi sangoŝmiron de malsanaj kaj mortintaj brutoj al iu bestkuraca explorejo. Iu ŝerculo, akcidente tranĉinte sian manon, sendis sian sangoŝmiron al la explorejo kaj poste disfanfaronis pri la afero. La novaĵo bedaŭrinde atingis la orelojn de la poliestro, kiu - ankaŭ bona ŝerculo - letere informis la explorejon kaj sugestis taŭgan respondon. Fine venis la longe atendita respondo: nenia nova malsano, sed ja ke la sango ne estas tiu de besto, sed homa kaj de miksrasulo!



E S Venter, Sudafriko

Alberto Santos, Torres Do Mar III-8-E,
S J Estoril 2765, Portugalio. 36-jara
profesoro deziras korespondi kun
sudafrikaj Esperantistoj pri ĉe-
fe la literaturo kaj filozofio.

L'inkpoto



S-ro I Ĝungi, CPO 4258, Seulo,
Koreujo. Deziras koni Sudafrikon pli bone. Li legis pri
la entrepreno de UEA disvastigi Esperanton en Afriko, do
decidis kunlabori per korespondado kun sudafrikano.
Interesoj, i.a. la kulturo kaj vivmanieroj de homoj en
Sudafriko.

Helpu niajn afrikajn amikojn kiuj tre volonte korespondos
kun Esperantistoj de la cetero de la mondo. Vidu paĝon 25.

(al p.24)

ANONCOJ

:Dum longa tempo Esperantistoj sentas sin nekontentaj pri la ŝajna nereguleco de Esperantaj landnomoj, loĝantoj, ŝtatoj ktp. 'Akademiaj Studoj 1984' okupiĝas pri tiu problemo. En ĝi estas konatiga tute nova sistemo COOL, kiu per aldono de unu nova sufikso -j- donas la eblecon distingi inter landanomoj: i) gentojn, ii) ŝtatojn, kaj inter la landnomoj inter: geografiaj regionoj, ŝtatonomoj kaj gentaj loĝregionoj. Por detala studo oni aĉetu la tutan volumon por \$8 10, sed por informo nur pri la sistemo COOL estas aparta represo havebla por \$1 75: R Eichholz, Esperanto Press, RR1, Bailieboro, Ontario, Kanado KOL 1B0.



:Tre interesa anglalingva libreto - 'G. Bernard Shaw on the question of a common language, in correspondence with Reto Rossetti; An interlude in five acts' estas havebla por £0 50 (10 aŭ pli po £0 35) de R Rossetti, 2 Elmwood Crescent, Luton, Beds., Anglujo LU2 7HX.

:71-a Universala Kongreso de Esperanto, 26 julio-2 aŭgusto, Pekino, Ĉinio. Konstanta adreso: UK de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Adreso de LKK: Poŝtfako 77, Beijing (Pekino), Ĉinio.

:Jarkunveno de la Sudafrika Esperanto-Asocio. La 21-a jarkunveno de la asocio okazos dimanĉon la 24-an de marto 1985 je 14h30 ĉe s-ro H W Appel, 8 St. Michael Road, New Redruth, Alberton 1450. Telefono 011 869 4031. (Vidu ankaŭ la Tagordon sur p. 21)

:ESPERANTO'S TIME HAS COME de Stanley Nisbet. Elstara libro propaganda. Havebla po R1,60. Mendu: Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1710 Florida Glen. Tel. 27-2363.

(L'inkpoto, de p. 22)

Carlos Hernan Palazzo, Avenue Pueyrredón 1217, 1118-Buenos Aires, Argentino. 31-jara italhispano. Amikeco, flankokupoj kaj ideoj. Skribu al li en la angla lingvo.

Iris Etcheverry, Paraguay 2552, PB "B", 1425-Buenos Aires, Argentino. 23-jara fraŭlino hispana. Pri amikeco, flankokupoj, sporto kaj ideoj. Skribu al ŝi en la angla lingvo.

Jaromir Masnik, Skrivancé c66, CS-46601 Jablonec n/n, Ĉeĥoslovakio deziras aŭtomapon pri Sudafriko. Bonvolu iu helpi lin.

Allan Penttinen, Parraskuja 8 C 18, SF-50170 Mikkeli, Finnlando. Finna pastro deziras korespondi kun sudafrikanoj.

Eija Jokinen, Saksalanraitti 8 E 35, SF-50170 Mikkeli, Finnlando estas 30-jara sinjorino kiu ŝatas korespondi kun sudafrikano.

Marek Bamberski, 42-300 UPT Myszkow, Pollando. 21-jara interesiĝas pri lingvoj, popmuziko kaj sporto kaj volas korespondi kun samaĝulo. Skribu ankaŭ pri la historio, nuntempa vivo kaj lingvaj/kulturaj problemoj de nia lando. Li taksas ĉi tiun peton tre grava.

(Anoncoj, de p. 23)

:Jaromir Masnik de Skrivance c66, CS-46601 Jablonec n/n, Ĉeĥoslovakio urĝe bezonas aŭtomapon de Sudafriko. Ĉu iu povas lin helpi?

:La patrino de Adèle Fouché mortis la 3-an de aŭgusto kaj ne en novembro kiel anoncita en la pasinta numero de BE. Pardonon de la redaktoro.

AFRIKAJ ESPERANTISTOJ DEZIRAS KORESPONDI

UEA: Ĝemelaj rilatoj (Hans Bakker, Kastelenstraat 231, 1082 EG Amsterdam, Nederland)

"Afrikaj lernantoj ne havas eblecon multe praktiki la lingvon. Korespondado estas por ili, krom plezuro, ankaŭ lernado. La ne-afrika korespondanto skribu nepre en senrara, simpla, klara Esperanto. Malfacilajn vortojn li traduku en nacia lingvo; se temas pri vera komencanto en Afriko, la leteroj eble estu en paralelaj versioj: naci-lingva kaj esperanta. La poŝto en Afriko estas ofte nefidebla. Ne nur ĝi funkcias malrapide, sed la malriĉaj poŝtistoj ofte ne rezistas la tenton ŝteli valoraĵojn. Por pakaĵoj do registro estas dezirinda; de leteroj oni prefere gardu kopion. Leterojn sendu aerpoŝte."

- :D-ro Akwasi Owusu Osei, Komfo Anokye Teaching Hospital, P O Box 1934, Kumasi, Gano. 26-jara kuracisto.
- :A E Foley, B P 13528, Lomé-Nyekonakpoe, Togolando atingis neperfektan, bazan lingvoscion. Li deziras korespondi pri radio-TVa tekniko.
- :Ier Hiag Ekanga, s/c M Bell, B P 1323, Douala, Kamerunio havas bazan scion pri E-o. 20-jara.
- :Eric Dokoui, s/c W Bernard, PTT Aplahoué, Benino estas 18-jara kaj jam kreis sian unuan E-o-klubon.
- :François Akpa estas tre entuziasma lernanto kaj amiko de Eric. Skribu al li: s/c Jacqueline Fangnon, Institutrice à l'Ecole de Base de Cadjéhoun, Groupe C, B P 434, Cotonou, Benino.
- :Lourenço Capita, s/c Sambou Tchimpolo, B P 155, Pointe Noire, Kongo estas rifuĝinto el Angolo kaj tre bona Esperantisto. Li estas senlabora kaj loĝas en mizeraj cirkonstancoj sed kun ellanda helpo fininstruis kaj ankoraŭ instruas plurajn lernantojn. Li bezonas diversaĝajn korespondantojn (15- ĝis multaĝajn).
- :Djamel Boumediene, B P 432, Tlemcen, Alĝerio estas 23-jara studento.
- :Sidibé Oumarou, B P 231, Banfora, Burkina Faso (estis Voltio) naskiĝis en 1958. Li estas publika skribisto kaj lernis E-on dum pli ol unu jaro. Lia granda deziro estas komerci kun eksterlando - importi rizon, sorgon, maizon kaj eksporti arakidojn, sezamon kaj 'amende de Kariti'



ALIĜILO AŬGSBURGO

70a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO
3-10 aŭgusto 1985
Aŭgsburgo
FR Germanio

Konstanta adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Adreso de LKK: Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg, FR Germanio
Poŝtĉekkonto de la Kongreso: n-ro 82 73 37 (nederlanda)
Banko de la Kongreso: AmRo Bank, Rotterdam, n-ro 42.69.01.444

uea-kodo
ingresumuro
dato de ricevo

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON, FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON - BONVOLU
TAJPI AŬ SKRIBI PRESLITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.

NOMO UEA-KODO
(familie aŭ ĉefe per alfabeto ordigo) (se konata)

CETERA(J) NOMO(J)
KOMPLETA POŝTA ADRESO (naciingve en latinaj literoj kun poŝtkodo ĝuste lokita)

LANDO
(en Esperanto)

NASKIĜDATO (juroloj/jafenoj) VIRO/VIRINO (kontraste uzaj)

NOMO/UEA-KODO DE KUNULO aliĝinta aŭ samtempe aliĝanta

PROFESIO/FAKO (pedeviga informeto)

- Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko;
mi sendas ĉi tiun aliĝilon kaj samtempe pagas laŭ la ĉi-suba specifo al:
- mia landa peranto (por Germanoj: LKK)
 Rotterdam
- per: poŝtmandato poŝta ĝiro banka ĝiro aŭ ĉeko, aldonante 6,50 gld
- aŭ: Mi sendas ĉi tiun aliĝilon rekte al Rotterdam - bv. debeti mian UEA-konton
- Mi ne povas jam aliĝi pro pasportaj aŭ transpegaj problemoj. Mi promesas pagi tuj post alveno en la kongresejo.

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO SUBSKRIBO

Por uzo de la administracio

uea-membro pagita por jaro

konfirmo de peranto:

konfirmo de C.O.:

PAGO EN C.O.

KONFIRMILO

notoj

KOTIZO (en kategorio.....)

ADOPTA KASO

BLINDULA KASO

LITERATURA KASO

ADOPTAJ GEPATROJ

BANKKOSTOJ (6,50 gld)

ENTUTE

Se vi aliĝas senpage, bv skribi ĉi tie la motivon

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ ĜIS: (ĉiuj en nederlandaj guldenoj)	84 12 31 (1-a periodo)	85 05 14 (2a periodo)	post 85 05 14 (3a periodo)
KATEGORIOJ (vidu difinojn sube):			
1. Kongresano NE individua membro de UEA	156	188	219
2. Individua membro de UEA	125	156	188
3. Kunulo/junulo/handikapulo, kiu NE estas individua membro de UEA	94	125	156
4. Kunulo/junulo/handikapulo, kiu estas individua membro de UEA	62	94	125

Difinoj

"Individua membro de UEA" estas tiu, kiu estas Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ) aŭ Membro-Abonanto (MA) kiam li/ŝi pagas la aliĝotizon.

"Kunulo" estas tiu, kiu loĝas samadrese kun aliĝinto. (Oni enskribu tiun aliflanke).

"Junulo" estas tiu, kiu je 85 01 01 estas malpli ol 26-jaraĝa. (Oni enskribu sian naskiĝdaton aliflanke).

"Handikapulo" estas tiu, kiu povas pruvi sian handikapecon per kuracista atesto. (Oni kunsendu la ateston kun la aliĝilo).

Senpagan aliĝon ricevas:

- infanoj ĝis inkluzive 13-jaraj, kiujn akompanas almenaŭ unu el la gepatroj aŭ alia plenaĝa kongresano rajtigita de la gepatroj
- akompanantoj de handikapuloj
- junuloj malpli ol 26-jaraj je 85 01 01, kiuj aliĝis al la 41-a IJK, Eringerfeld.

La kotizo ne estos repagita, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperos en la Dua Bulteno aperonta ĉirkaŭ februaro.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de pago. Aliĝilon sen komplota pago oni ne traktos.

Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Personoj kun transpagaĵ aŭ pasportaĵ problemoj rajtas sendi la aliĝilon sen samtempa pago al Rotterdam. Oni ne konsideros ilin aliĝintaj sed ili havos la rajton aliĝi tuj post alveno en la kongresejo, pagante tie laŭ la tarifo de la unua periodo.

Karavanaĵ aliĝoj: ekzistas aparta Karavana Regularo, laŭ kiu grupoj de minimume 25 personoj rajtas aliĝi kontraŭ 90% de la kotizo en kategorio 2, eĉ se ili ne estas membroj de UEA. Petu plian informon ĉe la Konstanta Adreso.

Kongresa Regularo: sekvas du ekstraktoj el la Kongresa Regularo, kiuj estas aparte gravaj por unuopaj kongresanoj.

"12. Al Universala Kongreso rajtas aliĝi ĉiu persono, kiu scias la Internacian Lingvon, kondiĉe ke li rekonu la Kongresan Regularon, submetiĝu al la leĝoj de la lando, kie okazas la Kongreso, kaj ke li faru nenion, kio povas malutili al la Kongreso."

"21. KKS devas atenti, ke neniu dokumento estu disdonata en la Kongreso sen antaŭa aprobo de la Estraro de UEA."

Tiuj, kiuj subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton por la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalaĵn Kongresojn.

**BONVOLU NEPRE SENDI VIAN ALIĜILON
KAJ KOTIZON AL LA SAMA INSTANCO.**

UEA anoncas la (re)aperon de

ESPERANTA ANTOLOGIO; POEMOJ 1887-1981

Universala Esperanto-Asocio eldonis ĉi tiun reprezentan poezian volumegon, sub la redakto de William Auld. Temas pri la dua eldono – abunde reviziita kaj kompletigita – de la iama "Esperanta antologio" (1958). En ĉi tiu preskaŭ 900-paĝa volumo – unu el la plej imponaj libroj en Esperanto – aperas 850 poemoj de 163 poetoj. Auld provizis la verkon per ampleksa postparolo pri la Esperanta poezia arto kaj per 36 paĝoj da biografiaj notoj.

Esperanta antologio: Poemoj 1887-1981. Red. William Auld (1924). Rotterdam: UEA, 1984 (2a eld.). 12 + 871p., 22cm. Bindita. Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*, n-ro 1. ISBN 92 9017 030 1. Prezo: 60,00 guilderoj.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

KSSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la

Koresponda Servo Mondskala de UEA

Adreso: KSM, p/a s-ro R. Llorens,

121 bis, Bd. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

LA JARO

1985

Ankaŭ en 1985 aperos – por la kvina fojo – la unika poŝ-kalendaro LA JARO kun multaj praktikaj kaj utilaj informoj. Sur 160 paĝoj vi trovas ne nur kalendaron kun la festotagoj de la diversaj landoj kaj mondreligioj, sed ankaŭ plej diversajn listojn kaj tabelojn, de geografio ĝis matematiko, ĵuloj kaj spicoj. Krome LA JARO enhavas kvar-lingvan vortareton kaj la fundamenton de Esperanto. En 1985 aperos aktualigita listo de landoj.

Ideala akompananto tra la jaro – kaj ideala donaceto vere favorpreza: nur 10 germanaj markoj aŭ egalvaloro (inkl. sendokostojn). Tuj mendu ĉe la libroservo de UEA aŭ ĉe: FLANDRA ESPERANTO-LIGO, Frankrijk-lei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, poŝtkonto 000-0265338-43.

LA JARO estas unu el la multaj bonaj ideoj de MONATO internacia magazino sendependa

FEACETIOLJ

Dua poemaro


originale verkita en Esperanto de

Reĵna de Jong

Poemoj lirikaj, socikritikaj, humuraj.

42 paĝoj.


Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam aŭ rekte ĉe la aŭtoro, Tomatenstraat 5, 2321 HC Leiden, Nederlando. Prezo: 5,10 gld. plus sendokostoj.



POEMOJ
1887-1981

ESPERANTA
ANTOLOGIO

A



ISSN 0006-7024

SUD-AFRIKO SEA